

Jarraporto 2021

malneto traktota dum la landa kunveno 2022

A. Ekstera informado

Amaskomunikiloj

Et verktøy for samarbeid og likeverdig dialog. Intervjuo kun Douglas Draper. *Fredsviljen* (Norges fredslag) 2020, p. 36

Romerikes Blad 26.3.21. Kristoffer Haug mencias en intervjuo pri MDG ke li parolas Esperanton.

En ampleksa intervjuo en retgazeto *iTromsø* 16.08.21 pri sia biciklado al Portugalio Claude Rouget menciis, ke li tranoktis survoje ĉe homoj, kiuj malfermas siajn hejmojn por aliaj, kiuj parolas Esperanton.

Adventnytt 6/2021. Nekrologo pri Alf Reidar Grødeland (Orre), kun mencio ke celkonscie lerninte Esperanton li praktikis ĝin en Norvegio kaj havis utilon de ĝi en vojaĝoj al Pollando kaj Francio.

Intervjuo pri Esperanto, inkl. Pasporta Servo, kun Henrik Håndlykken, Jacob Grevstad kaj Alexander Harestad K. ĉe *Framtida.no* 2/11.

Tutpaga artikolo pri juda kuracisto, kiu kreis Esperanton – lingvon pro havigi pacon. Bona klarigo pri Esperanto, gramatiko kaj praktiko. *Norge idag* n-ro 44

Longa intervjuo pri Esperanto en NRK 10.10.2021 kun Jardar Eggesbø Abrahamsen: “Mannen som ville skape fred med ord”

Longa intervjuo kun Monika Machlik en Nordlys 22.12.2021 pri diversaj temoj, inter ili Esperanto.

Interreto

Ni havas retpaĝaron kaj retpoŝtan sistemon. Ilin administras Jardar Eggesbø Abrahamsen kaj Judith Parelie Abrahamsen. La retpaĝoj enhavas ampleksajn informojn pri Esperanto norveglingve, liston de kontaktpersonoj kaj informojn pri aĉetebla literaturo, aranĝoj ktp. Ni afiŝadas la estrarajn protokolojn de NEL tie. Krom tio la ĝisdatigoj estis maloftaj, parte pro manko de taŭgaj novaĵoj. Ankaŭ

NJE havas retpaĝojn, kie publikiĝis ĉiu numero de *Inter Ni Dirite*. La paĝaro de NEL ligas al la paĝaro de NJE.

NEL havas la konton @esperantonytt ĉe *Twitter*, sed estis minimuma aktivado tie dum 2021 (unu mesaĝo). NEL estas ankaŭ en *Facebook*, estis afiŝitaj 14 mesaĝoj tie en 2021.

Informbudoj/prelegoj

Pro la korona pandemio ne okazis informbudoj aŭ informaj prelegoj.

Informado en la norvega

Esperanto-nytt unupaĝa (A4) aperis regule, trifoje dum la jaro kaj estis dissendita rete al interesiĝantoj 107 (104) kaj al NEL-inform, kaj ni afiŝis ĝin ĉe esperanto.no/e-nytt.

Eldoniĝis nova broŝuro *Esperanto – det internasjonale språket* fare de Amelie Matt. Ĝi estas plurkolora kaj celita por elprintado kun lokaj adaptoj. Ni ankoraŭ havas iomete da broŝuro *Oppdag esperanto* de 2012.

Informpetoj

Venis kelkaj malmultaj informpetoj dum 2021, kaj rete kaj ĉe porde en la oficejo en Oslo.

B. Instruado

Ĉeestaj kursoj

Pro la pandemio ne okazis ĉeestaj kursoj en 2021.

Interretaj kursoj

En la TTT-ejo estas ligiloj al la plej aktualaj kursoj, lernu.net kaj duolingo.com. Iuj certe lernas memstare per tiuj kursoj, sed ni ne scias kiom, ĉar nur kelkaj turnas sin al NEL aŭ loka klubo.

Ekzamenoj

La estraro proponas KER-ekzamenojn por tiuj, kiuj volas havi ekzamenon.

Instruantoj

Neniu membro petis subtenon por lerni instruadon en 2021.

C. Kontakto kun la kluboj kaj membroj

Landa Kongreso

La unuan fojon la landa kongreso de NEL pro la pandemio okazis virtuale la 5-an kaj 6-an de junio. Ĉeestis 16 membroj. La landa kunveno traktis la jarraportojn kaj jarkalkulojn por 2018, 2019 kaj 2020, diskutis la ricevitaĵajn proponojn kaj aprobis plilongigon de la laborplano por 2019-2021. Estis elektita nova estraro ĝis la sekva landa kunveno.

Kiel gasto estis invitita prof. Duncan Charters, prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, kiu prelegis sub la titolo «Kial pli hela estonteco por Esperanto?». Vespere estis ankaŭ neformala reta kunestado, kun komunaj ludoj kaj koncerteto de Kim J. Henriksen.

Seminarioj por membroj

Estis organizitaj du virtualaj seminarioj en 2021, aldone al la landa kongreso. La 17-an de aprilo TEJO-prezidanto Charlotte Scherping Larsson, asistate de Albert Stalin Garrido kaj Nicson Kasolene, prezentis la agadon de TEJO. La 25-an de novembro la temo estis la rolo de naciaj lingvoj en supera edukado kaj scienco. Bård Hekland prezentis la staton de la norvega lingvo en tiuj kampoj. Al ambaŭ aranĝoj estis invititaj la membroj de niaj najbarlandaj asocioj, kaj ĉeestis ankaŭ personoj de pli foraj landoj.

Norvega Esperantisto

Ankaŭ dum 2021 nia membrogazeto *Norvega Esperantisto* donadis al la membroj la plej gravajn informojn. Eldoniĝis 65 numeroj, 23 havis 1620 paĝojn, la aliaj 1212 kaj 2416 – inkl. de *Inter Ni Dirite* (la junularaj paĝoj) en 3 numeroj. Redaktis Douglas Draper; enpaĝigis Douglas Draper kaj Judith Parelie Abrahamsen; presis Land trykkeri, Dokka (je tre favora prezo).

Krom al la membroj ni sendis *Norvega Esperantisto* al kelkaj norvegaj kaj eksterlandaj pagantaj abonantoj kaj donacabonantoj; ni sendis ĝin senpage al kelkaj norvegaj kaj ĉ. 25 (25) eksterlandaj ricevantoj (inter ili estraranoj de UEA), kaj interŝanĝe al ĉ. 20 (20) eksterlandaj eldonantoj de Esperantaj periodaĵoj. Cetere ni sendis la gazeton papere kaj senpage al la najbaraj landaj asocioj kaj al tiuj de kelkaj malriĉaj landoj.

Tio estas sume iom sub la minimuma nombro (200) por havi rabaton pri la sendo. Ni suplementis sendante al norvegaj informpetintoj kaj interŝanĝe al aliaj landaj organizoj. Ekde n-ro 6/2020 ni havas interkonsenton kun SEF laŭ kiu ni dissendas la svedan *La Espero* rete al NEL-inform, dum ili simile dissendas al siaj membroj.

Retlistoj

La retpoŝtliston por membroj, *NEL-inform*, administris Jardar E. Abrahamsen tra servilo ĉe *Nettverksgrupper*. Per ĝi estas atingebblaj 59 membroj (58), kaj sendiĝis 80 mesaĝoj (59).

La diskutlisto *NEL-diskut* estis malferma por ĉiuj. En 2021 membris tie 37 (37) personoj, inter ili kelkaj eksterlandanoj. La liston administris Jardar Eggesbø Abrahamsen. Sendiĝis 3 mesaĝoj (2). Okaze de ŝanĝo de retpoŝta servilo la listo malfondiĝis la 30an de novembro 2021.

Lokaj kluboj

Laŭstatutajn jarraportojn pri 2021 sendis la kluboj de Tromsø, Trondheim kaj Oslo.

Nur la Oslo-klubo eldonas propran kluban bultenon. La kluboj de Oslo, Trondheim kaj Tromsø havas retpaĝojn en TTT.

La klubo en Tromsø kunvenis 4 fojojn tra la jaro, el kiuj unufoje virtuale. Vizitis la klubon esperantisto el Finnlando. .

Pro la pandemio la klubo en Trondheim kunvenis nur rete, tamen nur dufoje. Temis pri la jarkunveno kaj pri funebra renkontiĝo okaze de la forpaso de Arne Olav Mjøen. Ne okazis kursoj aŭ alia alekstera agado en 2021, sed ja regulaj retaj kunvenoj kun esperantistoj en la ĝemelurbo Darmstadt.

En Oslo ordinaraj kunvenoj okazis la unuan mardon kaj la trian lundon de la monato. Tamen plurajn fojojn ili ne povis okazi, ne nur en julio kaj aŭgusto, pro la pandemio kovim-19.

En Bergeno estis tri kunvenoj en la urba biblioteko aŭ apuda kafejo. Aldone kelkaj klubanoj kunvenis por la virtuala landa kongreso.

La komunaj societoj de Bryne kaj Stavanger/Sandnes en Rogalando ne aranĝis klubkunvenojn dum 2021 pro la pandemio. Kelkaj membroj tamen agadis kaj inter si mem aŭ kune kun aliaj esperantistoj.

NEL-estraj protokoloj

La estraj protokoloj afiŝiĝis en niaj retpaĝoj, kaj la membrogazeto peris la plej gravajn punktojn.

Ĉ. Aliaj projektoj kaj aplikoj

Vortara projekto

Ne estis aktiveco en 2021.

Haveblas provizora listo de vortoj kiuj mankas en la norvega–Esperanto vortaro de 1963. 16 p. A5.

D. Administrado

Retservilo

La retpaĝaro situas ĉe la firmao Initio Medielab en Trondheim. La 30an de novembro 2021 Judith Parelle Abrahamsen kaj Jardar Eggesbø Abrahamsen movis la retpoŝtan sistemon, ĝis tiam situanta ĉe Initio, al servilo de la firmao Domeneshop, pro malfondo de la servo ĉe Initio.

La oficejo

En la oficejo en Oslo deĵoris ĉefe Douglas Draper, kiu ankaŭ respondecis pri arĥivado. La estraranoj troviĝas tra la tuta lando, kaj preskaŭ la tuta komunikado inter ili okazis per Interreto. Okazis 9 (8) retaj estraraj interkonsiliĝoj.

Teknikaĵoj

Herman Raner en Trondheim asistis la oficejon en Oslo pri komputilaj kaj telefonaj praktikaĵoj, zorgante pri diversaj agordoj laŭbezone.

En 2021 okazis ankaŭ tri iom pli grandaj laboroj pri la komputilo, la reto kaj la retservoj ĉe la oficejo:

– En julio ni instalis novan version de la operaciumo (Ubuntu 20.04) en la oficejan komputilon.

– En decembro NEL ŝanĝis sian retpoŝtservon al la komerca ofertanto Domainshop AS, kio postulis de ni plurtagan laboron ĉe la oficeja komputilo. La retpoŝto ekde la ŝanĝo uzas la protokolon IMAP, tiel ke la tuta retpoŝtarĥivo nun situas en la servilo de Domeneshop (kun paralela kopio en la oficeja komputilo).

– Ankaŭ en decembro la ofertanto de retkonekto, Telia, renovigis sian reton. Surloke oni devis ŝanĝi la kablomodemon kaj la rutilon, jam poŝte ricevitajn. Dekomence Telia planis ke la abonanto mem alkuflu la novajn aparatojn, sed post teĥnikaj komplikajtoj Telia tamen devis elsendi teĥnikiston por finfari la instalon. Tio estis senkosta, sed retkonekton tute mankis en la oficejo dum ĉ. unu semajno.

Cetere ni plievoluigis la ĉiutagajn procedurojn pri sekurkopiado. Nun du sendependaj sekurkopioj de la oficeja komputilo ekzistas en du diversaj USB-memoriloj.

La Esperanto-Domo (Esperantonia)

NEL posedas duonon de Esperantonia, kaj la Oslo-klubo posedas same multe. La posedantoj dividas inter si la loĝkostojn. Ekde 2008 la Oslo-klubo ricevas 60% el la luig-enspezoj. Ne estis tiaj enspezoj en 2021.

Membrostatistiko por NEL en 2021

En 2021 NEL havis 6 aliĝintajn klubojn (6).

La membronombroj estis en 2021 (2020):

Bergen	9	(10)
Bryne	6	(7)
Oslo	40	(40)
Stavanger	3	(3)
Tromsø	11	(11)
Trondheim	13	(13)
<hr/>		
Kluboj sume	82	(90)
Rektaj	32	(29)
<hr/>		
Membroj entute	114	(119)

Membroj laŭ kategorio:

<i>Klubanoj:</i>		
Ordinaraj	48	(53)
Junulaj	10	(10)
Samdomaj	7	(7)
Dumvivaj	17	(19)
<i>Rektaj:</i>		
Ordinaraj	24	(20)
Junulaj	3	(3)
Samdomaj	0	(0)
Dumvivaj	5	(6)

Ekonomio

La spezokonto de NEL estis pozitiva en 2021, nur dank'al profito de investita malnova kapitalo en Skagenfondene. La saldo de ordinaraj rimedoj kaj kostoj montras malprofiton de ĉ. 15 000 kronoj. Kotizoj kaj rimedoj pli-malpli samnivele kiel en 2020, sed kostoj koncerne la ejon en Oslo kreskis je preskaŭ 40%. La ejo estas parto de loĝejkooperativo kaj ne havas influon al la decidoj de ties estraro. Ĉiuj aliaj kostoj malkreskis, inkluzive por la revuo, sekve al ŝanĝo de aperritmo (5 numeroj en 2021 anstataŭ 6 antaŭe).

Dum ŝparaĵoj de NEL donas grandan profiton tra Skagenfondene, la ordinara malprofito ne estas financa problemo. Sed estas kompreneble diskutinde ĉu la

Esperanto-movado en Norvegio devus dependi de akcia merkato kaj investado. Tamen necesas menciigi ke eĉ sen akcia profito, NEL povus elteni 25 jarojn kun sama malprofito kiel en 2021, antaŭ ol la asocio bankrotus.

Legaco Rolf Uhlen

La legaco Uhlen havas paĝon en nia retejo www.esperanto.no.

Ĝi ne donis subvencion en 2021.

La kapitalo je la fino de 2021 estis 1 045 544 kr. (Netuŝebla: 712 501 kr.)

Reprezentantoj de NEL ĝis la landa kunveno:

- Herman Ranes (prez.), kun anstataŭanto Leif Arne Storset
- Judith Parelle Abrahamsen (kas.), kun anstataŭanto Marianne Lund

Reprezentantoj de NEL post la landa kunveno

- Herman Ranes (prezidanto)
- Judith Parelle Abrahamsen (kasisto)
- Ulf Lunde (estrarano)
- Bård Hekland kaj Leif Arne Storset (anstataŭantoj)

Stiftingstilynet aprobis la novan statuton la 20an de januaro 2021. Ekde tiu dato neniu referenco al NEFA plu estas en la statuto.

Norvega Junularo Esperantista

2021 denove estis tre malaktiva jaro por NJE. La membrogazeto *Inter ni dirite* aperis unufoje. Krom tio ne estis aktivado. Ne aranĝiĝis jarkunveno, ne elektiĝis nova estraro. Tamen restas junulaj membroj, sed NJE devas esti reviviĝita por denove iĝi aktiva kaj funkcia organizaĵo.

Biblioteko

En Esperantonia ni havis en 2021 ĉirkaŭ 30 bretometrojn da libroj kaj kajeroj. Al la biblioteko aldoniĝis ĉ. 1,20,8 bretometrojn de libroj hereditaj de Pepita de Caspary. Centra responsulo pri la Biblioteko estas Douglas Draper. Librojn kiujn ni havas 2- aŭ pli-ekzemplere ni ofertas per www.esperanto.no → movado → biblioteko por po 20 kr. Preskaŭ neniu aĉetis.

Granda kolekto da Esperantolibroj troviĝas ankaŭ en la Nacia Biblioteko de Norvegio en Mo i Rana, de kie oni senpage povas prunti per ajna loka biblioteko.

Internacia organizo

Komitatano A de UEA estas Kjell Peder Hoff.

Ĉefdelegito de UEA, Agnar Fitjar, peris informon de UEA pri **22** (25) membroj de NEL kiuj estis ankaŭ individuaj membroj de UEA en 2021, laŭ kategorioj jenaj:

Membro-Abonanto	7 (9)
Membro Baza (antaŭe kun Jarlibro aŭ kun Gvidlibro)	9 (11)
Dumviva Membro	6 (5)

Aliaj membrokategorioj:

Societo Zamenhof	1 (2)
Dumviva Patrono de TEJO	1 (1)

Universala Kongreso

6 (6) norvegoj aliĝis al la 106-a Universala Kongreso, kiu pro la pandemio estis organizita kiel virtuala kongreso.

Kunlaboro kun ne-Esperantaj organizoj

NEL estas membro de la studasocio *Næring og samfunn* kaj membro de *FN-sambandet*.

Ĝis la landa kunveno en junio la estraron konsistigis:

- prezidanto: Mario Machlik
- vicprezidanto: Jardar Eggesbø Abrahamsen
- sekretario: Bård Hekland
- kasisto: Claude Rouget
- estrarano: Lars Sandbakk
- anstataŭanto 1: Amelie Matt
- anstataŭanto 2: Herman Ranæs

La estraro de NEL estis post la landa kunveno en 2021:

- prezidanto: Bård Hekland
- vicprezidanto: Jardar Eggesbø Abrahamsen
- sekretario: Marianne Lund
- kasisto: Claude Rouget
- estrarano: Lars Sandbakk
- anstataŭanto 1: Vidar B. Skretting
- anstataŭanto 2: Henrik Håndlykken*

* Henrik Håndlykken poste informis, ke li tamen ne volis partopreni la estraran laboron.

E. Resumo

Malgraŭ niaj pasintjaraj esperoj, ankaŭ 2021 iĝis jaro forte stampita de kovim-19. Kaj nia landa kongreso kaj la Universala Kongreso devis okazi virtuale. La

pandemio ankaŭ tre limigis nian lokan agadon, kaj niaj restantaj kluboj neofte povis kunveni.

NEL tamen sukcesis aranĝi plurajn retajn kunvenojn kun sufiĉe altnivela enhavo. Pri tio ni ĝoju. Sed ni konstatas certan lacecon pri tiaj retaj aranĝoj, kiuj ankaŭ devas konkuri kun vasta internacia oferto. Apenaŭ la novstilaj kunvenformoj altiris tute novajn homojn al la asocia agado, kaj ne multas gejunuloj, kvankam ĝuste junaj norvegparolantoj estas definitiva kiel nia ĉefa celgrupo. Pozitiva estas la kontakto kun niaj najbarlandaj asocioj, sed ni ne sukcesis grave plivastigi tiun agadon en 2021. Espereble novan puŝon tiudirekte povos doni la okazigo de nova skandinava kongreso en majo 2022.

La estraro i.a. per NE-isto iniciatis diskuton pri la estonta asocia laboro. Pri kio ni koncentru niajn limigitajn fortojn kaj rimedojn? Kion ni faru pri nia ejo kaj aliaj servoj? Tiu diskuto pludaŭros en 2022, kaj espereble ankaŭ alvenos al iuj konkludoj en nia landa kunveno.

La 21-an de marto 2021

La Liga Estraro

Bård Hekland

Jardar Eggesbø Abrahamsen, Mariane Lund, Claude Rouget,

Lars Sandbak, Vidar B. Skretting

Aŭskultu novan artikolon ĉiun tagon (ankaŭ dimanĉe)

Interrete ĉe aldone.de → retradio (maldekstre, malsupre)

Aŭskultu kaj legu – ekzemple "Vespoj estas utilaj" aŭ " Dum paŭzoj la cerbo lernas 20-oble pli rapide"

Aŭ legu pli longan (kaj pli pezan) artikolon ĉe eo.mondediplo.com/
(tradukitaj el *Le Monde Diplomatique*).

Spezokonto de Norvega Esperanto-Ligo

	2020	2021	
Rimedoj			<i>Noto</i>
Membrokotizoj	32 632	31 793	
Uzo de kunvenejo (Osloa klubo)	15 200	15 200	
Donacoj (specifcelaj k. ĝeneralaj)	5 020	6 590	1
Vendoj kaj abonoj	906	366	
Aliaj enspezoj	0	580	
Sumo de la ordinaraj rimedoj	53 758	54 529	
Kostoj			
Oficejo/domo (luo, elektro, ktp)	32 132	44 516	2
Revuo (presado kaj sendado)	14 758	12 424	3
Kotizoj plupagataj al kluboj	6 098	5 600	4
Subteno al Norvega Junularo Esp.	2 500	0	
Kotizo al UEA (aligitaj membroj)	1 211	1 362	
Kotizoj al eksteraj organizaĵoj	2 500	2 500	
Aliaj kostoj	6 997	3 216	
Sumo de la ordinaraj kostoj	66 196	69 618	
Bankaj kaj financaj (mal)kostoj	8 947	20 929	5
Saldo spezoj	-3 491	5 840	

Noto

- 1 Donaco al domkonto: kr.5 000
- 2 Luo: kr.35 017; elektro: kr.5 245; asekuro: kr.2 071; domimpostoj: kr.2 183
- 3 Presado: kr.3 850; sendado: kr.8 574
- 4 Oslo kr.3 680; Trondheim kr.1 055; Tromsø kr.865
- 5 Skagen vekst kaj høyrente kreskis je kr.19 410

Bilancio de NEL je 31-a de decembro

2020 2021

Aktivoj

Oficejo (simbola valoro)	97 667	97 667
Akcioj (SKAGEN Fondene)	215 482	236 467
DNB-konto de ILEI-sekcio	11 235	11 235
Uzkontoj ĉe UEA kaj FEL	4 506	2 610
Aliaj uzkontoj ĉe DNB & kaso	56 201	42 952
Sumo de la aktivoj	385 091	390 931

Pasivoj

Ĝenerala kapitalo	262 814	259 323
Saldo spezoj	-3 491	5 840
Propaganda fondaĵo	47 167	47 167
Studfondaĵo	45 344	45 344
Domkonto	23 593	23 593
Deponaĵo de Bergena E-klubo	9 664	9 664
Sumo de la pasivoj	385 091	390 931

Claude Rouget, kasisto de NEL

Eventa servo

Ĉiaj venontaj renkontiĝoj ordigitaj laŭ dato kaj horo ĉe eventaservo.org.

Esperanto-literojn ĉ ĝ ĥ ĵ ŝ ŭ trovi ĉe typeit.org.

Aŭ konvertu cx- aŭ ch-tekston ĉe liberafolio.org dekstramarĝene, plej malsupre.